

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO KAJ DE LA BULGARA ESPERANTO-INSTITUTO

Препоржчано отъ Министерството на Народната Просвѣта за училищнитѣ библиотеки съ окржжно № 1870 отъ 27 януарий, 1922

Jarabono: 20 bulgaraj levoj  
1 sv. fr. aŭ egalvaloro

Anoncoj: 2 levoj je kvadrata  
cm. Anoncetoj: 1 levo je vorto

Adreso: Sofio. Poŝkesto 233

Redaktoro Sim. St. Hesapčiev

Dum la propa-  
ganda vojaĝo de  
nia redaktoro. En  
la insulo „Svo-  
boda“ apud Pa-  
zarĝik.

La tria staranta  
estas nia redak-  
toro. La unua  
sidanta — s-ano  
Iv. Konstantinov,  
del. de UEA.



Kurso ĉe la komerca gimnazio en V.-Tirnov.

## Pri la reformoj en la internacia organizo

### 1.

La redakcio ricevis kaj represas la jenan cirkuleron:

Rotterdam, Decembro, 1932.

Tre estimataj gesamideanoj,

Eble vi aŭdis pri la propono, akceptita en Parizo pri la starigo de nova organizo.

La propono, per kiu UEA fakte estas nuligata (feliĉe nur sur papero) estas tiel kontraŭ ĉiu sana penso kaj kontraŭ ĉiu scio pri realeco, ke apenaŭ estas kredeble, ke ĝi estas farita de bonpensantaj homoj.

Oni ne bezonas grandan saĝecon por scii, ke asocio nur povas esti nuligita de siaj propraj anoj kaj laŭ la reguloj de siaj statutoj. Estas ridinde, se eksteruloj, aŭ kelkaj membroj sub influo de tiujeksteruloj faras decidon pri nuligo de ia asocio.

La sola, kiu vere estas nuligita per la nuligo de la kontrakto de Helsinki estas... la ICK, ĉar ICK estas kreita per kontrakto de Helsinki.

La tuta afero estas spekulacio rilate al la indiferenteco kaj senpripenseco de la gesperantistoj.

Gesamideanoj! Ekvekiĝu!

Gardu vian plej valoran posedaĵon!!!

Ne atendu ĝis oni mortigis UEA.

Nova organizo, kiu estas pli bona ol la nuna, ne estas atendebla de personoj, kiuj montris tiel malmulte da ordinara penso.

Dum 25 jaroj UEA laboris por la enkonduko de Esperanto en la praktikan vivon. Dum la sama tempo la teoriuloj senĉese, sed

vane interdiskutis pri organizo.

Rajdante sur la ĉevalo, ili ĝin serĉis!

...Kaj rapide kreskas la afero  
Per laboro de la esperantoj.

Ne per diskutado kaj kverelado de la esperantoj.

La sola taŭga formo por la organizo de la esperanta popolo estas:

La internacia formo.

Unuiĝo de naciaj societoj, inter kiuj estas diversaj, kies anoj en sia nacia lingvo diskutas pri organizo, ne estas bonforma.

Unuiĝo de naciaj societoj, en kiu la membroj estas dividataj en partoj kun algluita nomkarto de ia nacio ne povas esti bona bazo por esperantista organizo.

...Sur neŭtrala lingva fundamento,  
Komprenante unu la alian,  
La popoloj faros en konsento  
Unu grandan rondon familian.

Sed oni ne faru diversajn laŭnaciajn rondojn.

Karaj gesamideanoj, ekvekiĝu!  
Ne toleru, ke la teoriuloj, kiuj dum la lastaj 25 jaroj foruzis grandan barelon da inko kaj ŝipŝarĝon da papero por neŭtrala interdiskutado, nun mortigu UEA.

La grupo „Mercurio“ en Rotterdam decidis proponi al sia nacia societo, ke ĝi ne plu donu monon por ICK antaŭ ol estos certe, ke la mono ne estos uzata por difekti la memstarecon de UEA.

Karaj gesamideanoj, uzu vian cerbon!

Nenio povas alporti la finan venkon krom la uzado de la lingvo.

Estas UEA, kiu laboradis por tiu uzado. Ĝi daŭrigu sian laboradon.

Elektu vian vojon! Aŭ daŭrigi tiun laboron, aŭ ekbruligi pli grandan senfinan diskutadon.

La elekto ne estas malfacila. La interdiskutado de la teoriuloj neniam haltos.

Ĝi ekzistas kaj ekzistos, kiel ĝi ekzistas en ĉiu alia granda movado. Ni lasu al ili tiun sporton, sed... miloj da voĉoj kriegu al ili:

Manoj for de UEA!

Ni restu fidelaj al UEA!

Subskribintoj ĝentile petas diskonigi la enhavon de tiuĉi cirkulero. Disdiradu ĝin!

La estraro de „la Espero“: H. Th. Bossman, prezidanto; D. v. Asperen, sekretario; P. M. Den Toonder, kasisto; W. Kok, bibliotekisto.

La estraro de „Merkurio“: J. D. Brakel, prezidanto; Chr. Kromziek, sekretario, putsche bocht 24 c. Rotterdam Z.; G. S. Pentermann, kasistino.

## 2.

La komitato de Universala Esperanto-Asocio invitis per letero de l'ICK de la 17-a de Novembro 1932 ekzameni kaj privoĉdoni la projekton de l'Universala Federacio Esperantista, konstatante, ke tiu Federacio konsistos senescepte el naciaj, t. e. regnaj societoj esperantistaj, ke estas lasata en ĝi loko nek por UEA kiel memstara asocio, nek por ĝiaj supernaciaj principoj, nek por ĝiaj membroj, tiom kiom ili ne apartenas samtempe al naciaj societoj, konsiderante, ke la partopreno de UEA en tiu Federacio ne estas dezirata de ĝiaj projektantoj, ke invito akcepti

ĝin estas nenio alia ol invito al memdissolviĝo de UEA,

deklaras tiun projekton ne diskutebla por la Asocio.

La komitato bedaŭras la disŝiron de la Kontrakto de Helsinko dum la Pariza Kongreso, kiel la okazigon de voĉdonadoj en certaj naciaj societoj, antaŭ kiam la mortigota UEA nur havas eblecon sin oficiale esprimi pri la projekto. Ĝi protestas kontraŭ la intenco kopii ĝian jarlibron kaj ĝian sistemon de servoj internaciaj — aranĝoj, kiujn kun multe da laboro kaj kostoj ĝi funkciigis dum baldaŭ 25 jaroj por la bono de la movado. Ĝi protestas kontraŭ malbonfamigoj de la Asocio kiel kontraŭ la invitoj al siaj delegitoj kaj membroj forlasi ĝin favore de la fondota Federacio.

Ĝi atentigas, ke tia malsolidereco, kaj la naciisma spirito, montrita en la Federacia plano, ne povas esti la morala bazo en organizo inter samideanoj. Konvinkita ke UEA en sia supernacia strukturo reprezentas plej bone la familian rondon Zamenhofan, la Komitato opinias, ke de la ekzisto kaj evoluo de UEA dependas grandparte la sorto de la Esperanto-movado.

Tial la Komitato konatigas solene, ke UEA intencas funkcii kiel antaŭe kaj resti fidela al siaj principoj.

Ĝi apelacias al la solidereco de siaj delegitoj kaj membroj, al la sento de justeco de la naciaj societoj, kaj al la prudento de ĉiuj esperantistoj. Ni nek malpacu, nek aranĝu multoble kaj komplike tion, kio jam en simpla kaj taŭga formo havas

## Български писателъ за Есперанто

По случай предстоящия юбилей на видния поетъ г. *Ник. Вас. Ракитинъ* въ Плевенъ предаваме мнението му за международния езикъ, адресирано до нашия съидейникъ г. Ив. Х. Кръстановъ:

... Вашето дѣло, а именно, да опознаете чуждия свѣтъ съ духовния животъ на нашата малка родина, ще спечели, вѣрвамъ, симпатии и приятели на националната ни кауза, която не зависи, особено въ днешно време, да бжде разрешена само отъ насъ. Ние имаме нужда отъ приятели въ цивилизования свѣтъ и тѣхъ ще намѣримъ, само като имъ дадемъ възможностъ да ни познаятъ и като ги заинтересуваме за своята сѣдба и съ своята, колкото и скромна да е, национална култура.

Международниятъ езикъ Есперанто, който, изглежда, Вие владѣте отлично, и за чието разпространение вие сте единъ ревностенъ апостолъ у насъ, въ тоя случай може да изиграе една завидна роля. Азъ знамъ, че задачата на тоя езикъ е по-голѣма—тя е общочовѣшка, но нали чрезъ отдѣлнитѣ народи, като се даде възможностъ на всѣки да развие своитѣ духовни сили и даде своитѣ

penon ekzisti. Al plivastigo de sia organiza kadro UEA estas preta. Sed tia organizo staru super la interesoj naciaj, kunigu laŭeble ĉiujn societojn kaj instituciojn laborantajn por nia lingvo, estu simpla, liberema, kaj respektu ĉies meritojn.

Kun varma danko por la multaj pruvoj de simpatio jam ricevita, la Komitato petas ĉiujn membrojn kaj amikojn de UEA disvastigi ĉi tiun decidon.

съкровища, ще се постигне общочовѣшкия идеалъ? Колкото повече връзкитѣ между народитѣ, даже между най-отдалеченитѣ, благодарение на неимовѣрното развитие и усъвършенствуване на съобщенията ставатъ по-близки и по-наложителни, тслкова и нуждата отъ международенъ езикъ, отъ Есперанто, става по-необходима.

И азъ вѣрвамъ въ бждащето на Есперанто, въ неговото универсално разпространение, както вѣрвамъ въ културата, чийто плодъ е тоя езикъ и която, освободила човѣка отъ животинството и въпрѣки непредвидени завои и неочаквани падения, го води чрезъ международната солидарностъ къмъ свобода братство и миръ\*.

Б. Р. Ний поздравяваме г. Ракитина и се ползуваме отъ случая да съобщимъ, че нѣколко негови стихотворения сж преведени отъ Есперанто на каталунски езикъ.

### A. S. CENTRA ESPERANTO LIBREJO

En la ĝenerala kunveno de akciuloj de la Akcia Societo „Centra Esperanto Librejo“ en Hago (Nederlando), okazinta la 18-an de Februaro, la bilanco kaj la konto de perdoj kaj profitoj estis aprobitaj kaj la dividendo pri 1932 fiksita je  $6\frac{1}{2}\%$  (antaŭan jaron  $7\%$ ). Kiel komisaro estis elektita s-ro N. de Boer.

Konforme al la statuto la kunveno preparolis la dividon de la plia profito kaj decidis donaci 65.23 guldenojn al la Internacia Centra Komitato de la Esperanto movado en Genève.

## 25-a Universala kongreso de Esperanto

Köln 29. Julio — 5. Aŭgusto 1933.

**Oficiala invito:** La ĉefurbestro de Köln, d-ro Konrad Adenauer, prezidanto de la Prusa ŝtata konsilantaro, invitis la jubilean kongreson.

La kongresa palaco de la urbo Köln, situanta en bela parko apud Rejno, estas je dispono de la kongresanoj.

**Adreso de la LKK:** 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Trajanstr. 25, Köln, Cermanujo.

**Poŝta ĉekkonto:** 25-a Universala Kongreso de Esperanto, Köln 52.

**Bankkonto:** Dresdner Bank, Depositenkasse Chlodwigplatz, Köln.

**Kotizoj:** la favoritkotizo de gmk. 18. — estas plilongigita ĝis la 31. 3. 1933. Post tiu dato validos la normkotizo de gmk. 20. — Junaj membroj: La ordinara kotizo por gejunuloj malpli ol 17-jaraj estas gmk. 5. — Gejunuloj ne rajtas ricevi la kongresajn dokumentojn. Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskarton senpage. Helpkongresanoj: Kiu ne povas ĉeesti la kongreson, povas tamen aliĝi kiel helpkongresano, pagante gmk. 10.

Valoran kongresmemoraĵon ricevos tiuj aliĝintoj, kiuj estos pagintaj sian kotizon ĝis fino de marto 1933.

**Donacoj** por la kongresa kaso estas plezure akceptataj. Ĝis nun ni ricevis gmk. 104,27.

**Blindula kaso:** La LKK akceptas mondonacojn por subteni partoprenon en la kongreso al blindaj gesamideanoj. La ĝis nun ricevita sumo estas gmk. 94,36.

**Konsilantoj:** La LKK al-

elektis s-ron Rausch kiel konsilanton.

**Aliĝoj:** Ĝis nun anoncis sian aliĝon 354 personoj el 26 landoj. Laŭlanda statistiko: Alĝerio 1; Anglujo 35, Aŭstralio 1, Aŭstrio 8, Belgujo 18, Ĉeĥoslovakujo 13, Danujo 2, Dancigo 1, Estonio 1, Finnlando 1, Francujo 42, Germanujo 144, Hispanujo 12 (inter ili tri el Katalunujo), Hungarujo 3, Italujo 13, Japanujo 1, Jugoslavujo 1, Nederlando 23, Nederl. Hindujo 1, Polujo 14 (inter ili n-roj 1-12 rezervitaj por familio Zamenhof), Rumanujo 1, Saar-teritorio 1, Skotlando 4, Svedujo 5, Svislando 8.

**Fakaj kunvenoj:** Krom la jam cititaj oni anoncis la sekvantajn fakajn kunvenojn: (Pri detaloj oni turnu sin al la organizantoj):

**Bahaanoj:** S-ro D-ro H. Grossmann, Friedrich Voglerstr. 26. Wienheim, Baden.

**Framasonoj:** S-ro Carl Barthel, Wöhlerstr. 14, Frankfurt-Main. Aliaj organizantoj bunvolu sufiĉe frue anonci siajn dezirojn.

**Festa iluminado** dum la kongreso. La urbo Köln ĵus promesis feste iluminadi la katedralon, ponton kaj rejnbordejn, okazaĵo kutima nur en gravaj festoj.

5,000 ekzemplerojn de nova gvidlibro konsentis al ni la magistrato de la urbo Köln. Ili estas senpage riceveblaj ĉe la adreso de LKK. Trajanstr. 25, Köln.

**Karavanoj** jam anoncitaj laŭ la lasta bulteno: The Britsch Esperanto Association, London; Registara konsilisto H. Steiner, Wien; Esperanto-Centro Itala,

Milano; Jakob Telling, Rotterdam.

Nove anoncitaj karavanoj:

S-ro H. Moy Thomas, ĉefdelegito de UEA, 142-a Camberwell Grove, London S. E. 5.

Internacia alcentra aerflugado el ĉiuj lokoj, de kiuj ekzistas regula aertrafiko rekte al la kongresurbo aŭ al Berlin. Oni bonvolu turni sin al: Friedrich Elersiek, Wilmsstr. 5. Berlin SW 61 (Germ); Svedoj bonvolu sin turni al: Esperanto Turista Komisiono, Heleneborgsgatan 6, Stockholm; Francoj bonvolu sin turni al: Globe Trotter. 75. Boulevard St. Germain, Paris VI.

Pago de kotizo: La kondiĉoj pri la forsendo de la mono estas malsamaj en la diversaj landoj. Tial ni rekomendas informiĝi ĉe nacia, resp. ŝtata bankoficejo enlanda. Laŭ niaj informoj ĉiuokaze estas eble, iamaniere forsendi tiel malgrandan sumon eksterlanden.

Pasporto. Estas oportune sin turni al la plej proksima germana konsulejo, kiu donas informojn pri pasporto, vizo ktp.

Specialaj kontoj por kongresanoj: Ĉar grandaj monsumoj ne estas forsendeblaj el diversaj landoj, LKK aranĝos al la kongresanoj specialajn kontojn, al kiuj oni iom post iom povas pagi iujn sumojn. La senditaj sumoj estos repagataj al la kongresanoj post ilia alveno en Köln. LKK sukcese klopodis pri malkaraj loĝejoj; detaloj en la venonta bulteno.

Informpetoj: Al ĉiuj informpetoj oni nepre aldonu respondkuponon. Bonvolu ne peti informojn jam donitajn en la ĝisnunaj bultenoj, ĉar estas ne eble al ni diversfoje ripeti al unuopaj petantoj la jam faritajn

## Al Leo

Sub la arom' parfuma  
de l'aĉetebila strata am'  
— adulta, nuda kaj volupta—  
la urbo tremas feste jam.

Vi tiam sola kaj timplena  
ekmarŝas — nekonata frat' —  
en inter la vizaĝoj gajaj  
de l'brila kaj bruanta strat'.

Por iĝi hela kaj sennoma  
en multaspekta strat-amas'—  
koloro brila el rubando  
de l'radioza fora vast' . . .

Parsifal

## La bona amiko

„Amiko“ nomu tiun ne  
Kiu ĉirkaŭas flate vin  
Kaj post la dorso via — ve!  
Li malamike montras sin.

Laŭdinda estas nur la vir',  
Se kun kuraĝ' mallaŭdas li,  
Se dum la via vivo-ir'  
Pekadis kaj eraris vi.

Se havas kamaradon vi,  
Ho, nomu lin „juvelo“, nur  
Se en mizero estas li  
Fidela ankaŭ sen polur'.

El germana tradukis.  
Kanho Haselbauer Braŭnaŭ  
Aŭstrujo

informojn.

Ju pli baldaŭ vi aliĝos, des  
pli multe vi faciligos nian labo-  
ron!

Loka Kongresa Komitato

## Fragmentoj el la moderna literaturo bulgara

El la bulgara tradukis Stefan Masârov

Geo Milev

### 17-a de januaro

En tiu ĉi tago mi estas naskita.

En tiu ĉi tago inter la glaciaj dentoj de la frosto estingiĝas mordite la lasta krio de l' neĝaj ŝtormoj. La granda urso hirtiĝas frostiĝinte — blanka — en glacio; inter ties brilantaj glaciaj dentoj — la rompita disko de l' polusa stelo.

Silento kaj senmovo de l'blua frosto; sub la sentremaj ĉielruĝoj de l' norda brilo.

Sur la sojlo de mia sorto staras la blankhara maljunulo Verŝanto: de mia sorto la kontinua fluo, kiun li verŝas — glaciigis mia sorto.

En tiu ĉi tago mi estas naskita kaj mia koro, novenaskita, momente glaciigis: kolosa brila peco da glacio.

Mi kredis, ke diafana lumoplena anĝelo alportis inter siaj delikataj fingroj mian koron — for de la beataj horizontoj. Li ne venis: la delikata koro mortis en la glaciaj ungoj de l' frosto.

En tiu ĉi tago mi estas naskita. Mia koro glaciigis: kolosa brila peco da glacio.

Mi ne amas. Mia koro estas glacio — ŝtono, fero — kruela. Mi amas nenion, neniun. Mi ne amas.

Ho, libro de l' malamoj!

Mi prenas en la mano mian koron — kolosan glacian blokon — kaj mi atendas: preta por batalo.

Ve al la molaj fruntoj!

Geo Milev

### Iam

Iam estis printempo, kaj somero, kaj ĉiuj sezonoj. Iam estis ankaŭ majo.

Iam, kun la unua spiro varma de l' printempaj maroj alflugadis en bruaj longaj aroj la hirundoj, alflugadis enamiĝintaj najtingaloj kaj puncaj rozoj floris antaŭ ĉiu fenestro.

Iam...

Neniam!

Neniam estis printempo, kaj majo, kaj hirundoj, kaj enamiĝintaj najtingaloj, kaj rozoj antaŭ ĉiu fenestro! Neniam estis idilio, neniam ekzistis Teokrito, Virgilio!

Hirundoj kaj najtingaloj troviĝas nur en la lernolibro de zoologio, kaj majo estas torento el la ĉiela akvo, kiu surverŝas la kotozajn vojojn, senĉese tage kaj nokte, — en malumo de timiga humida nokto, kiam preter la malforta lumo de forlasita lanterno en senhoma strato paŝas kun larĝaj gamboj nigra vira silueto kun sako sur dorso, kaj post li alkurras ploranta infano.

Kiu rapidas tiel malfrue tra la pluvo kaj mallumo?

El „Malbelaj prozaĵoj.“

Ĉavdar Mutafov

### Dandy an sich

(Variacio en blanko).

Dandy rigardis la neĝon kaj sentis la penon de la senforto. Tra la fenestro estis vidataj la trankvilaj perspektivoj de l' mortanta urbo kaj sur la griza deli-

kateco de l' bukla malproksimo akre kaj profunde reliefigis la nigra reto de l' nudaj branĉoj. Malhela kaj malvarma krepusko falis kaj igis la konturojn de l' kamentuboj esti palaj sur la ĉielo. Kaj nur la sensenta kaj morta blankeco de l' neĝo blindigis ĉion per sia brila senmovo. Kaj malgranda verda stelo malrapide estingiĝis meze de kruda obskuro de la opala ĉielo.

Dandy laciĝis rigardi ĉi tiun sonĝan kaj kolosan mason da neĝo kaj sentis en sia animo la severan kaj lacigan doloron de l' vivo. Lia animo same dormis en la malvarmaj ĉirkaŭprenoj de l' silento kaj enuo. Vintro, vintro. Fino de ĉio, sonĝo, malhela kaj peza, sonĝo kaj forgeso. Senbrue kaj kviete la vivo finiĝas meze de glaciiganta heleco de dezerto, kaj la animo, lacigita kaj blanka, pereis en rigido.

Dandy rigardis la neĝon, preskaŭ blindigita de ĝia unutoneco kaj sentis la penon de la senforto. Ah, iam la vivo estis tiel bela kun sia sonora vario de koloroj kaj sonoj. Meze de l' brila gamo de lumo kaj koloroj Dandy bele travivis la donacojn de sia animo. Kaj en la bruaj kaj tintaj fanfaroj de l' volo, li ekkonis la ekstazon de la feliĉo.

Li ekkonis. Iam, antaŭ miloj da jaroj post la morta unutoneco de l' forgeso kaj sonĝo. Fino, fino. Kun sia blanka polvo la neĝo kovris la pompajn belaĵojn da l' vivo. Kaj lacigita la animo malrapide endormiĝas en la tremoj de la vintro.

Malhela kaj malvarma krepusko falis ekstere kaj igis la konturojn de l' kamentuboj esti palaj. Kaj malgranda verda stelo malrapide mortis meze de kruda obskuro de la opala ĉielo.

El la libro „Marionetoj“

## Agla plumo\*)

Mi estis infano. Foje, kurante tra herbejoj, mi trovis aglan plumon. Granda, bela agla plumo. Kiu estis pli feliĉa ol mi? Mi ĝin levis alten en manoj kaj kuris plenforte. Ŝajnis al mi, ke mi flugis kun la facileco de l' aglo.

Mi fariĝis junulo. Tiam mi ornamis mian ĉapelon per tiu agla plumo kaj ekamis la plej belan knabinon en la mondo. Kiu tiam estis pli feliĉa ol mi?

Mi estis malriĉa; mi posedis nenion alian, sed nur tiun aglan plumon, kaj la amata de mi knabino perfidis min. Iuj estis dirintaj al ŝi, ke oni ne povas vivi bone en la mondo nur kun agla plumo. Ŝia bona, virina animo facile komprenis tion, kaj ŝi min forlasis.

Neniu estis pli malfeliĉa ol mi.

Mi kaŝis la aglan plumon: mia koro ne permesis al mi porti ĝin plu. En mia animo enloĝiĝis malĝojo, kiun per nenio mi povis forpeli. De tiam mi ekvidis, ke la plimulto da homoj suferas kiel mi, kaj eĉ pli ol mi.

Kial la vivo estas tiel malĝoja?

Mi eligis denove la aglan plumon, sed mi estis nek infano por ludi per ĝi, nek junulo por ornami min. Tiam mi ĝin pintigis kaj faris el ĝi skribilon. Mi ekvolis skribi ion ĝojan, sed naskiĝis io malĝoja.

Trad. Iv. H. Krestanov

\*) El la prespreta manuskripto de la 25 elektitaj prozversajoj kaj rakontoj de Elin Pelin, esperantigitaj de I. H. K.



## Scienca Fundamenta Esperanta Terminaro

Наученъ основенъ есперантски словарь, часть ботаника, по Роле де л' Иль. Българска редакция на Ст. Масъровъ, студентъ по лесовъдство.

### Органология

#### I. Elementoj

Organoj (1) de planto (2) aŭ vegetalo (3) konsistas el histoj (4) formataj per ĉeloj, fibroj kaj angioj.

Vegetala ĉelo (5) konsistas el protoplasmo (6), kerno (7) kaj membrano (8) kiel la animala ĉelo. Sed ĝi plie entenas la ŭcitojn (9) el kiuj multaj estas verdaj pro la klorofilo (10), kiun ili entenas. Ekstera membrano entenas celulozon (11).

Pario de la ĉeloj, kiuj troviĝas ĉe la surfaco de kelkaj vegetaloj plidikiĝas kaj formas tavolon, kiu ĉe la arboj, nomiĝas ŝelo (12).

Fibroj (13) estas tre longformaj ĉeloj, lignecaj, kiuj ne plu entenas protoplasmon.

Angioj (14) rezultas el vico de longaj fibroj; per ili efektiviĝas cirkulado de la suko (15) el la radikoj al la folioj.

Parenkimo (16) estas histo, kiu kunigas la diversajn aliajn histojn.

Fasko (17) konsistas el ĉeloj kaj angioj.

#### Organoj

##### II. Radiko

Radiko (18) estas organo, kiu eniras vertikale en la grundon; sur ĝi estas fiksitaj radik-

#### I. Елементи

Органитъ (1) на растението (2 и 3) се състоятъ отъ тъкани (4) образувани отъ клетки, влакна и трахеи.

Растителната клетка (5) се състои отъ протоплазма (6), ядро (7) и мембрана (8) както животинската клетка. Но тя съдържа въ повече хроматофори (9), отъ които много сж зелени поради хлорофила (10), що съдържатъ. Външната мембрана съдържа целулоза (11).

Граничния пластъ на клеткитъ, които се намиратъ на повърхността на нѣкои растения се надебелява и образува слой, който у дърветата се нарича кора (12).

Влакната (13) сж продълговати клетки, вдървенѣли, които вече не съдържатъ протоплазма.

Трахеитъ (14) се получаватъ отъ редица дълги клетки; презо тѣхъ се извършва движението на сока (15) отъ коренитъ къмъ листата.

Паренхимата (16) е тъканъ, която съединява различнитъ други тъкани.

Снопчето (17) се състои отъ клетки и трахеи.

#### Органи

##### II. Коренъ

Коренътъ (18) е органъ, който се вдава вертикално въ почвата; на него сж закрепени

etoj (19), radikoj pli malgrandaj ol la ĉefa.

Se tiu ĉefa radiko havas nur radiketojn, ĝi estas nomata pivotrado (20).

Adventaj (21) radikoj elkreskas el la ĉefa radiko.

### III. Tigo

Tigo (22) kunligas foliojn kaj radikojn.

Kelkfoje subtera tigo plidikiĝas ĉe kelkaj partoj kaj formas tuberojn (23).

Tigo de arbo (24) estas fortika; ĝi nomiĝas trunko (25) interna parto estas ligno (26) kaj ekstera, basto (27) ekstere de la basto estas ŝelo.

Arbedo (28) estas planto kun ligneca malalta trunketo, havanta branĉojn tuj de la bazo; arbusto (29) estas planto ligna ĉe la bazo kaj el molaj histoj ĉe la supro.

Sur tigo, en diversaj lokoj, estas burĝonoj (30), el kiuj eliras branĉoj (31).

Kelkaj plantoj havas tigon nomitan rajlo (32), kiu estas plej ofte malplena krom en kelkaj lokoj nomitaj nodoj (33), el kiuj eliras la folioj.

Sur tigo kaj branĉoj estas elkfoje dornoj (34). Tigode fango estos nomata stromo (35).

### IV. Folio

Folio (36) konsistas el tri partoj: limbo (37) membraneca parto insertita (38) sur la tigo, aŭ portata de petiolo (39) ingo (40) alligas petiolon al tigo.

кореновитъ власинки (19), корени по-малки отъ главния.

Ако тоя главенъ коренъ има само коренови власинки, нарича се стволъ (20).

Вторичнитъ (21) корени израстватъ отъ главния коренъ.

### III. Стъбло

Стъблото (22) свързва листата и коренитъ.

Понѣкога подземното стъбло се надебелява въ известни части и образува грудки (23).

Стъблото на дървото (24) е здраво; то се нарича стволъ (25); вътрешната частъ е дървесина (26), а външната — лико (27); навънъ отъ ликото се намира кората.

Шиблякъ\*) (28) е растение съ вдървенѣло ниско стъбло имащо клони още отъ основата; храстъ (29) е растение дървесно при основата и отъ меки тъкани при върха.

По стъблото, на различни мѣста, има пжпки (30), изъ които излизатъ клони (31).

Нѣкои растения иматъ стъбло наречено слама (32), което е най-често кухо, освенъ въ известни мѣста наречени възли (33), изъ които излизатъ листата. По стъблото и клонитъ има понѣкога бодли (34). Стъблото на гжбата се нарича строма (35).

### IV. Листъ

Листътъ (36) се състои отъ три части: петура (37) плоска частъ положена (38) на стъблото, или носена отъ листна дрѣжка (39); вла-

\*) По опредѣлението на проф. Адамовичъ. С. М.

Limbo estas plej ofte verda kaj trairata de maldikaj foliofibroj (41).

Bulbo (42) estas aro da folioj, destinita por nutri la planton je la momento de la ĝermado. Ĉe la bazo de folioj en kelkaj plantoj, kreskas stipolo (43) fadenforma, dornoforma aŭ skvamforma kreskaĵo.

## V. Floro

Floro (44) konsistas el partoj nomataj verticeloj (45), kiuj estas el ekstero al interno

kaliko (46) formata per sepaloj (47),

korolo (48) formata el petaloj (49).

androceo (50) formata el stamenoj (52).

pistilo (52) formata el karpeloj (53).

Aro da envolvantaj partoj estas perianto (54).

Stameno konsistas el filamento (55) kaj antero (56); ĝi estas vira organo. Karpelo, ina organo, konsistas el ovario (57), stiluso (58) kaj stigmato (59).

Burĝono fariĝas butono (60), kiu poste fariĝas floro.

Floro estas portata de pedunklo (61), kies ekstremaĵo estas pedicelo (62).

## VI. Frukto

Kiam floro falas, aŭ sekiĝas, antero malfermiĝas kaj poleno (63) estas transportata sur stigmato; tiam ero de poleno ĝer-

галището (40) свързва листната дръжка за стъблото.

Петурата е най-често зелена и кръстосана отъ тънки жилки или нерви (41).

Луковица (42) е група листа определена да храни растението въ момента на поникването.

При основата на листа, у нѣкои растения израства прилистникъ (43) нишкоподобенъ, бодлоподобенъ или люспенъ израстѣкъ.

## V. Цвѣтъ

Цвѣтѣтъ (44) се състои отъ части наречени цвѣтни части (45), които сж отъ вънка на вжтре.

чашка (46) образувана отъ чашелистчета (47);

венче (48) образувано отъ венчелистчета (49);

андроцей (50) образуванъ отъ тичинки (51);

пестникъ (52) образуванъ отъ плодници (53).

Група отъ завиващи части даватъ цвѣтната обвивка (54).

Тичинката се състои отъ дръжка (55) и прашичкова торбичка (56); тя е мъжки органъ. Плодникѣтъ, женски органъ, се състои отъ яйчникъ (57), стѣлбче (58) и близалце (59).

Неразпуканата пжпка става цвѣтна пжпка (60).

Цвѣтѣтъ се носи отъ цвѣтна ось (61), чийто край се нарича цвѣтна дръжка (62).

## VI. Плодъ

Когато цвѣтѣтъ пада, или изсъхва, прашичковата торбичка се разтваря и цвѣтниятъ прашецъ (63) се от-

mas (64) laŭ tubo, kiu eniras tra stiluso en ovarion; tie ĝi kuniĝas kun ovulo (65) kaj fariĝas frukto (66).

Pario de ovario fariĝas perikarpo (67); ovuloj fariĝas granoj.

Frukto estas:

akeno (68)) kiam perikarpo ne kuniĝas kun la grano;

kapsulo (69) kiam ĝi entenas kelkajn granojn;

graningo (70) kiam granoj altenas al placento laŭ la longo de la kunliga linio de la tubo formita de la frukto;

bero (71) kiam perikarpo estas nuda;

drupo (72) se ĝi entenas kernon;

dehiska (73) kiam ĝi malfermiĝas ne disŝiriĝante por liberigi granojn;

matura (74) kiam ĝi atingas sian plejan kreskadon.

molmatur (75) kiam ĝi moligiĝas pro troa maturiĝo.

(Daŭrigota.)

нася върху близалцето; тогава зърно отъ цвѣтния пращецъ покълва (64) по тржбицата, що влиза презъ стълбчето въ яйчника; тамъ то се слива съ яйцеклетката (65) и става плодъ (66).

Външната частъ на яйчника става перикарпъ (67); яйцеклеткитѣ ставатъ семена.

Плодътъ бива:

зърно (68) когато перикарпа не се съединява съ семето;

кутийка (69) когато съдържа нѣколко семена;

шушулка (70) когато семената сж привързани къмъ плацентата по дължината на шева на тржбата образувана отъ плода;

ягода (71) когато перикарпа е голъ;

костилковъ плодъ (72) ако съдържа костилка;

разпукливъ плодъ (73) когато се разтваря за да освободи семената безъ да се пука.

зрѣлъ (74) когато достига крайното си нарасване;

презрѣлъ (75) когато става мекъ поради чрезмѣрно узрѣване.

(Следва)

## Universala Esperanto-Metodo de d-ro W. Benson

Enhavanta kompletan rektan kernolibron, ampleksan ilustritan legolibron, universalan multlingvan bildvortaron. 41 lingvoj. 11,000 bildoj. 100 listoj de samspecaj vortoj. 2 plenpaĝaj tabeloj de la prononcado de la esperanta alfabeto en 36 lingvoj. 5 plenpaĝaj tabeloj de la korelativoj en 36 lingvoj. Kompleta indekso. Paĝoj 560, formato 16×23 c. m. Prezo 4 usonaj dolaroj. Eldonas Benson

School of Esperanto, 719 High Street, Newark, New Jersey, U. S. A. 1932.

Ne estas multaj la verkoj en nia literaturo, kiuj de tempo al tempo aperas kaj altiras al si la atenton de la tutmonda esperantistaro. La samideanoj scias, ke antaŭ nelonge aperis la „Universala Esperantistigilo“ de d-ro Benson. Ĝiatempe oni ĝin renkontis bonege. Nun aperas dua

eldono de la sama—pligrandigita kaj en ĉiuj siaj partoj relaborita. Laŭ sia plano kaj plenumo ĝi estas verko, kiu neniam aperis en iu ajn lingvo.

La verkego konsistas el kvar partoj: La unua parto estas la rekta bildmetoda lerno-libro — esperantistigilo kun multaj bonegaj ekzemploj kaj laŭmetodaj ekzercoj. Post ĉiu leciono estas donita bildaro, laŭ kiu oni devas kombini tekston (diktografo). En la fino de la metoda parto estas donitaj 5 plenpaĝaj tabeloj de la korelativoj, klarigitaj en 36 lingvoj.

La dua parto prezentas ampleksan krestomation, enhavanta bone elektitajn rakontojn, fabelojn, humoraĵojn, versaĵojn, sciencajn artikolojn k. c., ĉerpitaj el la plej bonaj nuntempaj kaj malnovaj gazetoj, revuoj kaj antologioj. Inter ili estas kelkaj ĉerpitaj el Bulgara Antologio.

La tria, plej grava kaj plej interesa, parto estas la plena universala vortaro. Ĝi estas unika ĝis nun en ĉiuj literaturoj. La vortoj estas klarigitaj per 8,000 speciale desegnitaj bildoj. Krom tio la plej oftaj vortoj estas tradukitaj en 40 lingvoj, inter kiuj la bulgara okupas 17-an lokon: angla, franca, hispana, itala, portugala, romanĉa, kataluna, rumana, germana, holanda, dana, norvega, sveda, juda, pola, rusa, bulgara, serba, ukraina, ĉeĥa, slovaka, slovena, kroata, hungara, albana, estona, finna, latva, litova, flandra, islanda, armena, turka, greka, kimra, araba, persa, hebrea, ĥina, japana. Ĉiu el tiuj ĉi lingvoj havas difinitan numeron kaj tial oni facile povas trovi ĉiam la tradukon de vorto en serĉata lingvo.

La vortaro enhavas la 4,000 radikojn aprobitajn de la lingva komitato kaj 1500 aliajn sciencajn kaj teknikajn vortojn. Krom tio estas donitaj multaj kompozitaj vortoj. La adverboj, prepozicioj, konjunkcioj, prefiksoj, sufiksoj k. a. estas klarigitaj per multaj ekzemploj, ĉerpitaj el la „Fundamento“. Al multaj vortoj, signifantaj sciencojn artojn k. a. estas aldonitaj bildoj de famaj fakuloj.

La kvara parto enhavas proksimume 100 listojn de samspecaj vortoj en alfabeto ordo.

En la fino estas aldonita alfabeto indekso de ĉio, kion enhavas la libro.

Koncize dirite, la verkego de d-ro Benson vekos la admiron kaj dankon de la tutmonda esperantistaro kaj de neesperantistoj.

Iloke en la krestomatio oni renkontas lingvajn erarojn, ŝuldatajn al la diversaj tradukintoj. Sed ja, tio estas homa ago kaj ĉiuj homaj agoj enhavas erarojn.

## Problemoj

De Doĉo T. Stanev.

1. Nenio, returnite — satelito; intermiksi ĝin, ĝi fariĝos mezuro.

2. Renversu la kapon de orientnacio: li tuj manĝebligis.

3. Korektu la preserarojn de la sekvantaj vortoj: kao, kao, klo, kao, klo, kao, kao, kdo, koo — tiamaniere, ke per enŝovotaj literoj vi ricevos tre konatan al la esperantistoj urbon.

4. Prenu beston, ĉielparton kaj konsonanton — aŭ prenu bestan strofon: vi havos la saman rezultaton.

La nomoj de la solvintoj estas publikigitaj. La tri unuaj ricevos premion.

Red.

## Движението въ чужбина

**Испания.** Испанското министерство на просвѣтата е отпуснало още 5,000 пезети на Испанския Esperantiski Сюзъ, за да разшири пропагандата и преподаването на Esperanto. Следъ това да се откриятъ въ Мадридъ и други мѣста кратки курсове за учители и да се раздадатъ 11 награди. Между наградитъ сж и една парична отъ 400 пезети и една конгресна карта за 25. свѣтовенъ esperantiski конгресъ въ Кьолнъ (29 юлий—5 августъ 1933 г.).

**Френското** Министерство на Въздухоплаването назначило съ указъ генералъ Делкамбръ — директоръ на националната служба за времето, за свой официаленъ замѣстникъ — представителъ при френското дружество за разпространение на Esperanto (SoFoPoE) по всички въпроси относно доупотрѣбата на Esperanto въ въздухоплаването.

**Токио.** На 4. януарий радио-

станцията въ Токио, позната подъ съкращението IOAK предаде една речъ на кмета на Токио г-нъ Хидегуро Нагома. Речъта се отнасяше до японското положение отъ международно гледище. Ораторътъ въ речъта си разгледа отъ петъ гледища международната съвременност. Отправи зовъ до народа да употребява Esperanto като единственъ международенъ езикъ.

**Лидия Заменхофъ**, дъщеря на автора на Esperanto, е водила курсъ въ Лионъ по покана на тамошната група. Пробниятъ урокъ е държанъ предъ повече отъ 400 лица, а около 170 души следвали курса.

Общинскиятъ съветъ поради голѣмиятъ успѣхъ е отпусналъ помощъ отъ 1000 франка на сщия курсъ.

Г-ца Заменхофъ прави пропагандна обиколка въ нѣкои френски градове, като въ всѣки държи кратъкъ курсъ отъ уроци.

## Enlanda kroniko

**Sevlievo.** Kurson gvidas s-ano Dim. Karagjozov — prez. de s-to „Fratiga stelo“. Vizitas regule ĉirkaŭ 15 personoj.

**Plovdiv.** Kurson gvidas por 30 pollicanoj s-ro Dam. Pacev sub protekto de la poliestro.

**Ruse.** S-to „Solidareco“ havas nunjaran estraron, kiu konsistas el la jenaj personoj: prezidanto: kapitano St. Radev, vicprezidanto: Dim. Petkov; sekretario: Iv. Kovaĉev; kassisto: Dim. Naĉev; bibliotekistino: s-ino Korabova kaj konsilantoj: Vl. Georgiev kaj Jos. Kleiner. La societo Intense preparas la kongreson, kies daton ni sciigos post nelonge.

Preskaŭ ĉiuloke, kie estas niaj samideanoj, estas gvidataj kursoj:

En Razgrad — kurso vizitata de 20—25 personoj.

En Saladinovo (Pazarĝiŝko) — vizitas 16 pesonoj.

En Debnevo (Trojansko) gvidas kurson f-ino Evgenia Barâмова — instruistino.

En Sviŝtov ĉe la komerca gimnazio.

En Batišnica (Belensko) — kurson vizitas 20 personoj. Gvidas St. Mandov — instruisto.

*La filmo* pri Köln jam rondvojaĝis tra la lando laŭ vojiro: Plovdiv, Haskovo, Sliven, Jambol, Gabrovo, Sevlievo, Vraca, Vidin, Lom, Gorna-Orehovica k.t.p.

S-ro P. G. Pamporov faris sukcesplenajn paroladojn pri Esperanto en Trojan, Loveĉ, Tirnovo, Gorna-

Orehovica, Leskovec, E. Djumaja, Ŝumen. En Varna li gvidis kun sukceso kurson vizitatan de 72 p., inter kiuj multaj geinstruistoj. En la knabina gimnazio oni gvidas apartan kurson.

*Sofia.* Dum februaro k. marto n. j. gastis tie ĉi la fama esperanto-oratoro kaj poeto D. ro Imanuel Olsvanger el Palestino. Kiel delegito de la cionista movado li faris kelkajn paroladojn en diversaj urboj. Dum marto alvenis el Kalifornio nia persa samideano Marzieh Carpenter. Ŝi okupiĝas pri la Bahaa movado.

*V.-Tirnov.* La societo ĉe la komerca gimnazio agas bone. La intereso plivigligita.

Ĉe la reala gimnazio estas fondita grupo „Flamo“. En la komenco enskribis sin por kurso tre multaj personoj. Nun vizitas 25—30 personoj. Oni rimarkas emon al pliperfektiĝo en la lingvo.

Propagandsemaĵoj okazis de 1<sup>a</sup> 6-a ĝis 12-a de februaro laŭ iniciato de 1<sup>a</sup> gelernanta Esperanto Socieio „Zamenhof“ ĉe la komerca gimnazio kaj kun la helpo de 1<sup>a</sup> urba grupo „Lumo“. Oni faris jenajn paroladojn:

1. „Esperanto kaj modernaj lingvoj“ de s-ro H. Bačvarov — je la 6-a de februaro lunde vespere en la knaba gimnazio.

2. „D-ro L. L. Zamenhof“ de s-ro Petkov lernanto en la komerca gimnazio — je la 8-a de februaro, marde vespere en la sama gimnazio.

3. „Esperanto kaj kulturo“ — de V. M. Ŝiskov — eksĉefsekretario de „Oomoto Internacia“ — en Parizo — je la 10-a de februaro vendrede vespere en la knabina gimnazio.

Ĉiuj menciitaj paroladoj estis vizititaj amase — ĉefe de gelernantoj

4. Sabata je 11-a de februaro tute neatendinte venis en la urbon s-ro P. G. Pamporov. Li tuj bonvolis aldoni ankoraŭ unu paroladon je la

temo „Vojaĝo tra Eŭropo nur per Esperanto“ — interesa kaj bonenhava parolado.

II. Novan Esperanto-kurson por komencantoj aranĝis la urba s-to „Lumo“ dum februaro, marto ĝis la mezo de aprilo. Gvidanto s-ro V. M. Ŝiskov.

III. Senpagaj Esperanto-kursoj nur por gelernantoj estas aranĝitaj ĉe ambaŭ gimnazioj — knaba kaj knabina — gvidas fino Angelova kaj s-ro Valčanov.

*Kneĵa.* Proksimume antaŭ kvar monatoj komencis preskaŭ samtempe du elementaj kursoj: unu civitana kun 15 personoj kaj alia laborista kun 30. S-ro Ĉarkov projektas trian kurson ĉe la praktika agrikultura lernejo.

## El la redakcio

N. V. en Tr. La tradukajo abundas je lingvaj eraroj kaj tial ni ne povas presigi ĝin. Ne senkuraĝiĝu! Provu ĉiam denove!

I. P. I. en K. Same.

Al. K. en J. Vi devas ankoraŭ lomi peni por doni taŭgajn kaj lingve korektajn tradukojn. Precipe atentu pri la transiraj kaj netransiraj verboj kaj zorgu ĉiam diferencigi ilin. Ni esperas, ke baldaŭ vi sendos bonajn tradukajojn.

K. N. en T. Estas laŭdinda via penso, ke vi devas partopreni aktive en nia movado. Ni ĝojas ankaŭ, ke vi konsilis viajn erarojn. Kvankam korektita, la manuskripto enhavas multajn erarojn. Penu ĉiam eviti ilin kaj ni esperas, ke vi sukcesos.

J. G. M. en J. Kvankam korektita, via manuskripto ne taŭgas kaj ne trovas lokon. La malmultaj lingvaj eraroj estas korekteblaj, sed viaj teoriaj vidpunktoj ne estas fortikaj. La temo estas serioza. Provu traduki ion el bulgara lingvo. Es-pereble vi sukcesos.

## Recenzejo

**Н. Лебедевъ — Елизе Реклю като човѣкъ, ученъ и мислителъ.** Превели отъ руски Г. Жечевъ и Ив. Калчевъ. София 1933 библиотека „Мисълъ и Воля“ № 2, форматъ 21 × 14 см., стр. 80. Цена 15 лева. Доставка редакцията на в. „Мисълъ и Воля“ бул. Ив. Асень II, № 7 — София 4.

Живо и картинно авторътъ рисува живота на единъ отъ малцината, които съ право могат да носят името „човѣци“. Преводачитъ сжщо така сж изпълнили добросъвестно и успѣшно задачата си.

Елизе Реклю е роденъ въ бедно пасторско семейство въ Южна Франция. Възпитанъ въ християнска нравственост не само съ думи, а и съ дѣла отъ родителитъ си. Живѣе въ планинитъ, играе и работи край потоци, скали, върхове. Още отъ малкъ изпитва любовъ къмъ природата и щастие средъ нея. Пѣтува пешъ до Германия за да се учи. Чете Фурие, Пиеръ Леру Прудона и др. Изгоненъ отъ Франция, живѣе известно време въ Англия. Пропѣтува и новия свѣтъ по всички посоки. Прави непосредни наблюдения на природата. За този дълбокъ и сериозенъ географъ географията е и наука за човѣка. Написва многотомнитъ съчинения „Всеобща география“ „Земята и хората“, и др. Самото описание на живота му буди любовъ къмъ природата и къмъ всичко живо, а отъ неговитъ съчинения тя се чувствува още по-силно. Реклю живѣе въ хармония съ всичко живо, защото такава той е установилъ преди всичко въ себе си. За него обществената революция ще настѣпи само следъ такава у индивидитъ, която е първа целъ.

Въ Брюкселъ Реклю основава частенъ университетъ който се пълни

съ слушатели и въ който се дава не само догматична сурова наука но и възпитание на личността съ примѣри. Цѣлъ животъ той работи неуморно, защото считаше труда за „нормално и естествено условие на живота което облагодарява човѣка...“

Отъ тази книга ще почерпятъ поука и примѣръ всички, които живѣятъ, или искатъ да живѣятъ въ хармония и хранятъ любовъ къмъ всичко, що ги окръжава.

**Ignat Herrmann — Fokso-Nukso.** Tradukis kaj eldonis Moraviaj Esperanto-Ploniroj, Olomouc ĈSR. Paĝoj 68. Formato 20 × 14 c. m. Prezo k. ĉ. 8, sv. fr. 1.25.

En ĝi oni legas bonstilan kaj bone tradukitan rakonton pri du hundoj.

Kolonelo el Polujo mendas bonrasan hundon (fokson) el Praha.

La terurigita pro la dumvojaĝa bruego hundo forkuras, kiam oni devis ĝin trinkigi ĉe malgranda stacio. La respondeca oficisto ensovastan malgrandan hundon de nedifinita raso kaj ĝin ricevas la mendinto. Li ne volas finpagi la hundon kaj de ambaŭ flankoj komenciĝas atakoj kaj insultoj. Oni procesas kaj fine reveturigas la hundon. Ĉe la sama stacio denova ŝanĝo kaj revenas al Praha la sama hundo, kiu foriris. Ĉio ĉi estas tre amuza por kolonelo Goljat, kiu fine pagis grandan sumon, perdinte la proceson. Lingvo bona kaj korekta. Altiras la atenton la divido per apostrofoj de kelkaj kompozitaj vortoj en okazoj, kie oni povus dubi pri ilia senco. Preseraroj nur kelkaj. Rekomendinda libro, kiun ĉiu legus kun plezuro kaj en bonhumoro.

Esperanta presejo „Kultura“  
Sofia, Bulgarujo